



# PILO-PRESS

Internacia  
Informservo

N-ro 33/75 8 sep 1975  
Aĉeras ĉiusemajne

Pilo-Press

Jara abono

30,- GM

=====  
Mendu nun!

P&Konto

Nürnberg 819 56-851

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pöckel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 1

Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

Salutojn al la legantoj  
de Eŭropa Esperanto-  
Revuo


=====  
Munkeno. (pp) Eŭropa  
Esperanto-Revuo rice-  
vis salutkarton de la  
26a Landa Kongreso de  
SPD Bavario (Social-  
demokrata Partio Ger-  
manio) sendita de  
Hermann Schmid, Augs-  
burg. La salutkarton  
(vidu apude!) subskri-  
bis krome:

Dr. Vogel, prezidanto  
de SPP Bavario kaj fe-  
deracia justicministro

Volkmar Gabert, SPD-  
frakciestro en la ba-  
vara parlamento

Helmut Schmidt, federa-  
cia kanceliero

Peter Glotz, ŝtatestre-  
tario en la ministerio  
por klerigo kaj scienco.



22,50

*An die  
Redaktion der  
Europ. Esperanto-  
Revuo  
85 Nürnberg  
Postfach 2113*

*Kovaj salutojn de la 26.  
Landsparteitag der SPD  
Bayern H. Schmidt*

*Herrn Schmidt  
Herrn Glotz*

CHRISTICH im Schwarzwald  
Hotel z. Oberreit Linda

\*\*\*\*\*

## Esperanto en "France Culture"

Parizo (SAT-amikaro). Mardon, la 2-an de septembro, de la 14,15 ĝis la 15,00 horo "France Culture" dissendis programon pri Esperanto kunlabore kun SAT-amikaro.

Ĉeestis Roland Grandière, ĝenerala sekretario de SAT-Amikaro, kun la individua partopreno de Dominique Respiney, Jean Thierry kaj esperantistoj el Anglio, Jugoslavio kaj Pollando. La "advokato de la diablo" estis s-ro Barbat, verkisto, poligloto scipovanta la francan, anglan, germanan, italan, rusan, hispanan kaj ĉinan lingvojn. Laŭdinda estis la objektiveco, interesiĝo kaj serioza pri-trakto de la temo flanke de la intervjuitoj, tiel ke malstreĉa atmosfero ebligis bonan programon.

Ĉe la fino, s-ro Barbat montriĝis konvinkita pri la valoro de nia lingvo kaj diris: "Mi promesas, ke mi lernos Esperanton!"

A  
Cu la suno de Esperanto leviĝas en Rumanio?

\*\*\*\*\*  
Bukuresto (zj) Baldaŭ, post la apero de la libro "Esperanto-lingva internaciana" de N.V. Bulencea, en "Contemporarul", rumanlingva semajngazeto de la Ministerio por Kulturo, aperis prestiĝa studo pri la nuna stato de la Internacia Lingvo Esperanto.

La aŭtoro, d-ro Ignat Fl. Bociort, universitata profesoro en Timisoara, prezentas al la legantaro objektivajn faktojn pri la kulturaj kaj sciencaj atingoj de la Esperanto-movado, argumentas por la solvo de la lingva problemo per Esperanto.

Tuj post la apero de tiu artikolo pozitivajn reagojn oni povis legi ankaŭ en la hungarlingva gazetararo de Rumanio.

La prestiĝa semajngazeto "A hét" (La semajno) aperigis artikolon kun la titolo "Pli ol lingva diskuto" kaj en la Covasna departementa gazeto "Tükör" (spegulo) en la rubriko "observanto" la redaktoro pozitive komentas la studon de profesoro Bociort.

La supraj aperigaĵoj supozigas, ke ankaŭ en Rumanio la "Suno de Esperanto post longa atendo leviĝas!"

\*\*\*\*\*

### Sukcesa agado en Munkeno

Munkeno (pp). Kelkaj esperantistoj de Munkeno, speciale Josef Weidacher kaj Horst Spirat, investis multe da tempo kaj energio kaj mono por realigi Esperanto-ekspozicion la 6an, 7an kaj 8an de septembro en la kunvenejo "Holzschuhner Bahnhof". Krom la konata materialo de GEFA oni preparis sufiĉe multajn kaj informoriĉajn tabulojn. Libroservo Ludwig Pichel ĉeestis kun librostando. La ekspozicion vizitis ĉ. 120 personoj, inter ili veraj novaj interesuloj. Lunde vespere, studprofesoro Thalmeier, Landskut, prezentis lumbildprelegon, kaj Horst Spirat donis malgrandan provlecionon. Tiun kunvenon ĉeestis ĉ. 50 personoj.

Dum la ekspozicio oni povis konatiĝi kun la instruprogramo kasetita por Esperanto de la firmao Intertip, pri kiu ni raportos aparte en unu el la venontaj numeroj de PP!

Por la preparo de la ekspozicio la loka Esperanto-grupo kaj la fervojista Esperanto-grupo elspezis ĉ. 1000 GM. Ne mankis kuriozaĵoj flanke de vizitantoj: Migrantara ĉarpentisto diris ke li lernis Esperanton dum 1943/1944 kaj ke "Hitler volis enkonduki Esperanton kiel mondan lingvon!" Alia vizitanto juna priminacis la organizantojn. Li diris, ke li plendos ĉe la prokuroro pro trompo, ĉar ĉiu substantivo finiĝas per "o". Kaj tion oni nomas "novan lingvon".



## Ges-roj Grattapaglia raportas

Torino (pp) Post sia prelegvojaĝo tra FRG ges-roj Grattapaglia sendis al Pilo-Press jenan raporton:

"Ni entute prelegis kaj prezentis filmon pri Bona Espero en Berlin (18.8.), Hamburg (26.8.), Bremen (27.8.), Münster(28.8.), Dortmund (29.8.), Mannheim (30.8.), Stuttgart (31.8.), Oberkirch (1.9.)

La ĉeestantoj meznombro estis inter 25 ĝis 45 personoj en ĉiu urbo. En Berlin, tagĵurnalo Morgenpost (20.8.) publikigis ampleksan artikolon pri nia socia laboro ligita al Esperanto. En Münster ni havis interesan kontakton kun ne-esperantista organizaĵo "Terre des Hommes", kiu agadas en Sud-Ameriko. Nia prelego estis anoncita ankaŭ en Mannheimer Morgen (30.8.), en "Stuttgarter Wochenspiegel" (31.8.) kaj eble aperis aŭ aperos aliaj artikoloj.

Entute la interesiĝo estis vigla kaj la originala ideo de Bona Espero kunligi la agadon por Esperanto al pli vasta eduka kaj socia laboro en tiuj brazilaj regionoj, estis favore pritaksata.

Multaj esperantistoj en pluraj urboj petis nin pli ofte informadi pri nia laboro, ĉar homoj, kiuj jam helpas iniciatojn en la t.n. "tria mondo", volonte subtenos tiucelan esperantistan institucion, kiel Bona Espero.

Ni deziras kore danki la germanajn Esperanto-grupojn, kiuj invitis nin kaj ĉiujn gesamideojn, kiuj akceptis kaj helpis nin en la diversaj urboj. Ni aparte dankas pro la donacoj ricevitaj por la infanoj de Bona Espero.

Kun mi kaj mia edzino vojaĝis tra via lando ankaŭ S-ano Renato Diniz, unu el la fondintoj de Bona Espero, kiu unufoje vizitis Germanujon, kaj kiu konservos pri tiu vojaĝo neforgeseblan rememoron."

+++++

## Esperanto ĉe Olimpiaj Ludoj 1976

Montrealo (pp) De Ing. U.P. Ronald, prezidanto de Kanada Esperanto-Asocio, ni ricevis jenan raporton:

"Jam venontan julion okazos la Olimpiaj Ludoj en Montrealo. La Olimpia Komitato de Kanada Esperanto-Asocio decidis ĉi-foje altrudi Esperanton ne de supre sed de malsupre. Ni reeldonas la libreton de ambasadoro Ralph Harry "Saluton Amiko", aldonante la francan tradukon kaj lasante neuzitan kolonon por ke ĉiu landa asocio aranĝu tradukon kaj presigon de la traduko sur strioj kiujn la atletoj engluos.

Necesos ankaŭ traduki leteron klarigante kial ni donacas la libron, kaj ofertante lernolibron kaj diskon se oni volas lerni la lingvon. Ĉio venos senpage!

Estas nia espero, ke sufiĉe granda ono de la naŭmilo povos uzi la lingvon por interkompreniĝo dum la ludoj, kaj ni provos publikigi la fakton, ke tio okazas. Tio povas influi la internacian olimpian komitaton multe pli ol amaso da leteroj certigantaj ke teorie estus eble.

Ni tamen ankaŭ provas persuadi la lokan olimpian komitaton pri la avantaĝoj de Esperanto, ekzemple ke ĉiuj aŭdiĝoj k.a.p. estu trilingvaj, do en la angla, franca kaj Esperanta., kaj ke la gegvidantoj lernu Esperanton. Ili jam petis nin kunmeti liston de esperantistoj kiuj konas ankaŭ la francan aŭ anglan kaj se eble ankaŭ aliajn lingvojn, kiuj prefereble estu inter 20 kaj 35 jaroj, kaj estos liberaj en la dua duono de julio 1976.

(daŭrigo sur paĝo 4!)

### (limpiaj ludoj 1976 (daŭrigo))

Estos pagata, sed la vojaĝon al kaj de Montrealo oni devos mem aranĝi, ankaŭ loĝejon k.t.p. Kelkajn 6 nomojn de Kanadanoj ni jam donis al ili. Kiu ajn interesiĝas bv. skribi al la sekretariino de nia komitato: S-ino H. Prenette, 3565 Soubirous, Montreal, Kanado H1X 1C3."

+++++

### Konkurso pri la urbo Plovdiv

Konkurson "Kien vi scias pri la urbo Plovdiv - historio kaj nuntempa evoluo?" anoncas la Esperanto-Societo "Kulturo", u. Plovdiv, Bulgario, omaĝe al la naskiĝtago de D-ro L.L. Zamenhof kaj al la 75-jariĝo de la societo.

Interesuloj kiuj deziras partopreni la konkurson skribu al la adreso: Esperanto-Societo "Kulturo", p.k. 151, 4000 Plovdiv, Bulgario, porricevi demandilon kaj akcesorajn materialojn. Respondojn sendu plej malfrue ĝis la 15.12.1975.

La gajnintoj de la premioj: Senpaga restado en la Internaciaj Someraj Esperanto-Kursoj en Pisanica; septaga restado en Plovdiv dum la Internacia Foiro; partopreno en la "Ora Feriado" en Pamporovo, estos anoncitaj la 15.02.1976 dum la solena celebrado de la societa jubileo.

Ĝiu partoprenanto ricevos atestilon.

### Gemeliĝo inter Le Havre kaj Southampton

Le Havre (pp) S-ro A. Chalm, leganto de Pilo-Press, informas:

"La 4-an de oktobro 1975 delegacio de la Havra Esperanta Grupo konsistanta el dek du personoj, iros al Southampton, Britio por efektivigi la ĝemeliĝon de la du urboj sur la esperantista kampo. La delegacio estos oficiale akceptita de la urbestro."

### Esperanto en radio

Fakte en la pasinta tempo ni neglektis la Esperanto-elsendojn de Radio Zagrebo. Sed estas nia principo recenzi aŭ mencii tiujn elsendojn kiujn ni fakte aŭskultis. Sed la Zagrebaj elsendoj ja okazas je tiom malfrua tempo, noktmeze, ke ne ĉiam eblas aŭskulti. Sed la lastan de la monato aŭgusto ni aŭskultis kun bona sukceso. La Novaĵoj el Jugoslavio ĉiam estas interesaj kaj aktualaj. La "Respondoj al niaj korespondantoj" montris, ke Zagrebo havas rondan da regulaj korespondantoj, kvankam tiu stacio ne havas korespondan servon. En la priparolo de ricevitaj periodaĵoj Emilia Lepenna konstatis, ke Pilo-Press ignoras certajn staciojn kiuj ankaŭ elsendas en Esperanto. (PP-respondo: Vidu supre!) Ankaŭ oni priparolis numerojn de Eŭropa Esperanto-Revuo.

Radio Varsovio. Varsovio nun ricevas tiom da korespondaĵoj, ke oni estonte rezignas pri la konstanta konkurso de la plej interesa korespondaĵo de la monato. Tamen ŝajnas al mi, ke estus bone, se oni estonte per lotumado disdonu premiojn inter la ĉiunonataj korespondantoj. Esperantistaj laŭreatoj partoprenis en la ekskurso tra Pollando.

Vieno. En la elsendo de la 6/7.9. diplom-inĝeniero Karl Fischer el Hamburgo parolis pri siaj impresoj dum la feriuma restado en Vieno ĉi-somere. La semajna komentario de d-ro Alfred Macher okupis sin pri la partia situacio en Aŭstrio kvar semajnojn antaŭ la porparlamentala elekto.

Romo. De januaro ĝis fine de aŭgusto Radio Romo, Esperanto-Redakcio, ricevis 800 korespondaĵojn. La redakcio, speciale d-ro Antonio De Salvo sopiras pri la 1000-a sendaĵo! Plenumu al li la deziron kaj skribu! Jen la adreso: Radio Roma - Esperanto, C.F. 320, I-00100 Roma, Italio! Redaktoroj de D-revuoj kaj aliaj konkrete interesitoj povas ricevi la tekstojn de elsendoj.